Federacia Cirkulero !

# NI KONGRESOS KUNE

Post diversaj kontaktoj kun la estroj de la Federacio Midi Pyrénées, oni decidis kune kun kongresi, do en

CARCASSONNE
LA 19 KAJ 20-AN DE MARTO 1983 .

Niajn amikojn el Midi-Pyrénées mi tutkore kaj samideane salutas, kaj, je la nomo de la du federacioj, invitas ilin partopreni nian komunan kongreson.

Mi esprimas en tiu frontpaĝo, la esperon ke ĝi estos pruvo de nia ambaŭa restarigo, kaj invitas ĉiujn al antaŭkongresa pripensado, surbaze de la temoj elektitaj kaj proponitaj de la federacianoj :

* Restruturigo kaj dinamiko
  Statutaj reformoj
* La Federacio en la sino de U.F.E.
* Pratikaj aspektoj :
  Regiona Vivo .

Tiuj punktoj estas kernaj, precipe ĉar ni estas meznivela strukturo, inter la lokaj grupoj kaj la nacia Asocio. Tial, ni devas difini kaj precizigi nian celon kaj la strukturojn uzendajn vid' al vide la aliajn.

Aliparte, nia nuntempa strukturo tute ne taŭgas al aliaj asocioj, precipe U.F.E., ĝenerale pro la fakto ke ni ne estas sufiĉe agemaj kaj viglaj. Sed ne temas pri akordiĝo sistematika kun la naciaj deziroj, sed reviviglo de niaj strukturoj, pliefikigo. Ĉar fakte, mi pensas ke la federacia sistemo estas pli taŭga dum longa agadperiodo; nur temas pri ĝia perfektigo.

Si vi volas ankaŭ defendi ĝin, por bonigi ĝin, venu al niaj kongresoj.Partoprenu unue per via ĉeesto, sed precipe per viaj proponoj, rimarkoj, malkonsentoj, voĉdonoj...Neniam forgesu ke nur vi rajtas decidi en la federacio. Sed vi maluzas ĝin, la Federacio estas mortanta.

Komprenebble, kiel ĉiuj, vi havas multon alian por fari, kelkaj partoprenas en aliaj organizoj... sed vi tutcerte povas dediĉi unu tagon kaj duono al la regiona vivo. Tio estas malmulte por vi, sed ĝi ebligos mirindan laboron federaciskale.

Vi trovos en tiu cirkulero, kiu anstataŭas la ne-aperintan "Sud Francia Stelo"n, ĉiujn informojn pri tagordo, temoj, aliĝoj, ĝeneralaj informoj.
Legu ĝin atente, kaj rapidege resendu la aliĝilon.

Vi bonvolu senkulpigi min se aperas kelkajn erarojn, ĉu lingvajn, ĉu pro tajpado. Fakte, tiu cirkulero estas redaktita, tajpita, preparita en nur unu tago kaj duono.(Mi estis nura volontulo pri la radaktigo).

Samtempe, mi dankas ege S-inojn Vienne, Callet, Leenhardt, kiuj zorgis pri agrafado, enskribiĝo de adresoj, sendado.

Kun la espero ke ni estos multnombraj en CARCASONNE por demonstri nian komunan volon aktive partopreni, Samideane Salutas vin viaj kunlaborantoj.

ALBAULT Odette
6, rue Douaumont
31200 Toulouse

MAURIN Frédéric.
20, rue de l'Aiguillerie
34000 Montpellier
Tel. (67) 66 21 01



# Organizado

Post perletera pridiskutado kun J. Amouroux kaj C. Borque, ni fiksis la jenan programon por la venonta federacia kongreso, okazonta en

CARCASSONNE
LA 19-AN KAJ 20-AN DE MARTO 1983.

<u>SABATON, LA 19-AN DE MARTO</u> .

ĉiuj aranĝoj okazos ĉe "Foyer d' éducation populaire de Grazailles".
( apud Stade-Piscine de Grazailles)

15.00 : Akcepto .
16.00 : Laboraj grupoj pri la diversaj temoj de la Kongreso, prepare al la morgaŭa ĝenerala Kunveno.
18.45 : Prelegoj / prelegetoj pri diversaj temoj, ĉu esperantistaj, ĉu aliaj .
19.30 : Komuna lunĉo surloke.
( kun antaŭmendo )
21.00 : Komuna distra vespero .

<u>DIMANĈON, LA 20-AN DE MARTO</u> .

ĉifoje, la kunveno okazos ĉe "Salle du Conseil Municipal". (Strato Courtejaire,
Apud la teatro en la malnova urbodomo )

9.30 : ĝenerala kunveno .
12.30 : komuna tagmanĝo ĉe la restoracio "Le Païcherou" (Apud rivero Aude )
14.00 : ĉu alia ĝenerala kunveno, se necesas .
ĉu vizito de la urbo . (La cité )

Komprenebble, la programo povos esti ŝanĝita se necesas. Vi bonvolu sciigi viajn rimarkojn al la prezidanto mem antaŭ la 1-an de marto .
Pri la distra vespero, alvokon ni lanĉas al ĉiuj amatorartistoj de la grupoj.

PRAKTIKAJ INFORMOJ - LOĜADO

Oni povas loĝi en :

- unustela hotelo : 1 dupersona lito : 45/50 FF .
(parta antaŭmendo : 40 FF )
- dustela hotelo : 1 dupersona lito : 50/55 FF .
(parta antaŭmendo : 50 FF )

ĉiuj prezoj estas indikitaj kun rezervo de altiĝo en marto.

Pri la dimanĉa komuna tagmanĝo, la unuopa prezo estas 65 FF . Vi bonvolu anonci viajn partoprenojn en la aliĝilo.

ATENTU : limdato por la rezervoj : la 5-an de marto.

SERVO : Tiuj, kiuj alvenos trajne kaj bezonos gvidanton por atingi la kongresejo, bonvolu averti S-on C. BORQUE, kiu respondecas pri loka organizo de la Kongreso.

PAGO DE LA ANTAUMENDO : Sendante la aliĝilon al S-o BORQUE, vi bonvolu aldoni ĉekon al :

Fed. Esperantiste Languedoc Rousillon
C.C.P. : 956 28 MONTPELLIER

Antaŭan Dankon.

Ne forgesu aldoni du poŝtmarkojn por administraĵoj.

===========================

CERBUMAJOJ : En la ĉi-suba adicio, ĉiu litero anstataŭas ciferon (1cifero = 1 litero ). Kaj la adicio komprenebl.e estas ĝusta.
Bonvolu re-ciferigi ĝin.

```
      P A T R O
+ P A T R I N O
+       F I L O
    F I L I N O
---------------
  F A M I L I O
```



# temoj.

REFORMES STATUTAIRES .

Le problème est de savoir comment, à partir du potentiel de membres dont nous disposons, il serait possible de tirer la plus grande efficacité de nos structures. C'est à dire savoir comment maintenir une constante arrivée de sang nouveau, dynamique dans nos instances.

C'est donc dans se sens que je propose une limitation de la durée des mandats, tout particulièrement celui du président à 3 ans. C'est à dire :

(Toute personne ayant assumé pendant trois ans les responsabilités de président fédéral, ne pourra être reconduit dans ces fonctions.

De telles dispositions ont l'avantage de :
- limiter les autoritarismes, les "petites manies" dues à un trop long exercice du pouvoir.
- Nous obliger à insuffler ce sang neuf tous les trois ans au plus, en utilisant le plus souvent les nouvelles vocations qui apparaissent dans le mouvement.
- intensifier la participation de tous à la vie fédérale, par cette accéssibilité retrouvée.

Bien sûr, certains points ne sont pas encore résolus. Cette proposition a l'interêt de créer, même artificiellement, une certaine "rotation des taches" et un plus grand intêressement.

U.F.E. ET LA FEDERATION .

C'est là aussi un problème de définition.Mais qui a des conséquences graves : Quel rôle doit-on jouer au sein de l'Association Nationale ? Sommes-nous seulement une filiale, une sous-traitante de U.F.E.? Ou est-ce vraiment à la base, c'est-à-dire dans les fédérations que les décisions se prennent.

Bien plus qu' un problème de procèdure, c'est un problème de structure. Je crois apercevoir deux optiques :

+ La Fédération se définit comme un union de groupes locaux, de membres isolés. Alors, elle adhère volontairement à U.F.E., et participe ainsi à la vie et aux décisions de celle-ci.
+ La fédération n'est que la représentante officielle de U.F.E. dans la région.Son rôle consiste donc à appliquer les décisions de celle-ci. Elle ne participe pas activement à la vie nationale.

Le débat n'est pas aussi théorique que ce que l'on pourrait penser. De plus en plus, U.F.E. tend à remplacer les organes de décision fédéraux -trop souvent inactifs, par ailleurs- par ses propres structures. Bons nombre d'adhérents ressentent cette hégémonie douce.
Un fait marquant, c'est le fait que certaines fédérations vont organiser leur congrès après le congrès national. Je ne compte pas m'ingérer dans des affaires d'autres fédérations, mais je me souviens avoir entendu des membres du bureau national se féliciter des facilités apportées par ce changement de procédure.

Ce paragraphe n'est d'ailleurs pas étranger au précedent. U.F.E. a besoin pour travailler de structures locales fiables, sérieuses et compétentes. On peut difficilement lui reprocher de remplacer ce qui ne fonctionne plus. Il nous reste à montrer notre attachement à la structure fédérale, en la présentant de nouveau comme une possibilité réelle de collaboration avec U.F.E..

ASPECTS PRATIQUES .

o Le problème le plus pressant est l'existence d'un bulletin de liaison qui soit très utile, facilement utilisable, et si possible non déficitaire. Le problème n'est pas nouveau, mais les bonnes intentions citées plus haut passent par certains moyens de liaisons. Plusieurs projets sont à l'étude, et en ce qui concerne le déficit, j'aimerai connaître l'avis des membres sur leurs impréssions à propos de cette circulaire. Elle pourrait servir de base de réflexion.
D'autre part, il semble que l'orientation de Sud Francia Stelo doit être moins techmique que pratique, c'est à dire augmenter la fiabilité, la fréquence, l'intêret et le contenu. Peut importe peut-être la qualité de l'impression.



o Ensuite, afin de rendre efficaces les réformes théoriques proposées, la Fédération doit avoir les possibilités de former certains de ces responsables, au niveau lingüistique, administratif ou de gestion. Bien sûr, nous n'avons pas les moyens financiers de ces mesures. C'est à ce titre qu'un travail collectif au niveau des responsables de groupes doit être fait, afin de comparer nos expériences et d'en faire profiter le plus grand nombre.
Dans un futur plus lointain, des structures d'aide financière (stipendio) aux responsables "prometteurs" pourrait être mises en place.

o Toujours dans la même optique, il semblerait que les échanges entre les structures féderales et les groupes pourraient être améliorés par la mise en place de contacts dans chaque groupe, et élus par les groupes, qui maintiendront une liaison constante avec la Fédération, ventileront les décisions, propositions, remarques dans les deux sens. Ce peut être le rôle des présidents de groupe, ou de quiconque.

o Il serait enfin intêressant de mettre en place dans une région aussi touristique que la notre, une structure allant dans ce sens. F-ino Vierne s'occupe déjà de l'acceuil des étrangers, Jean Hénin des affaires touristiques, et il serait envisageable d'ouvrir et d'élargir ces activités.(Guides touristiques..)
Nous tacherons d'apporter plus d'éléments d'information avant le Congrès.

DE PLUS . . .

Tous les membres de la Fédération ont droit au vote, et dans le cas où ils ne pourraient participer au Congrès, il est rappelé l'usage du vote par procuration.

Enfin, la structure d'U.F.E. impose que les questions posées lors du congrès national le soit à travers les structures fédérales. Pensez-y, faites nous le savoir, ou parlez-en en congrès fédéral, afin que le représentant désigné puisse les poser.

# nia ekspozicio ..

ĉu vi povas disponi pri 6 metroj da muro ?

Ne ĉe vi, sed ĉe kultura centro, junulardomo, lernejo, publika loko ...

1983 estas oficiale la jaro de Internacia Komunikado. Tiu temo rilatas al Esperanto, do estas bona okazo aùdigi nin. Ni montru kiel Esperanto favoras pli bonan komunikadon.

Jen ekspluataj eroj :

1) Malfacileco de komunikado. (ĝenerala aspekto, multlingveco,...)

2) Sed novaj eblecoj dank'al tekniko.(Komputiloj, aùtomataj tradukmaŝinoj,...)

3) Problemoj de superpotenca lingvo.

4) La Internacia Lingvo Esperanto (Oni prefere uzu tiun esprimon ol Esperanton) ebligas renkontojn de diversaj homoj.

5) ĝi ebligas renkontojn de gejunulojn.

6) ĝi ankaù ebligas dialogon inter la du partoj de Eùropo, kaj inter Nordo kaj Sudo.

7) ĝi ebligas konatiĝon kaj respekton de malproksimaj kulturoj.


8) ĝi ankoraù ebligas ekkonon de la kulturoj de malgrandaj landoj.

9) ĝi faciligas vojaĝon. (Pasporta Servo, Delegita Reto...)

10) ĝi faciligas kaj pliriĉigas turismon. (Ni povos montri prospektojn pri unu lando.)

11) ĝi ebligas al progresantaj landoj la akiradon de modernaj sciencoj.

12) La I.L.E. estas lernebla de ĉiuj : ĉu per kursoj (buŝaj aù perkorespondaj), ĉu per staĝoj.



6-A INTERNACIA ESPERANTISTA SEMAJNO
ĈE MEDITERANEO .

1983.IX.11/18

KIEL KUTIME, LA SEMAJNO OKAZOS EN LA FERIEJO LE LAZARET, EN PARKO DE DU HEKTAROJ, REKTE ĈE LA MARO.

Oni povas loĝi en la feriejo laŭ la prezoj :
1 persono en unupersona ĉambro : 150F
" " du " : 135F
" " tri " : 125F

La prezoj entenas la loĝadon kaj la tri manĝojn.
Sed nur estas rezervitaj 40 litoj, do

ANTAUMENDU RAPIDE !!!!

( limdato de antaŭmendo de ĉambro : 1983.VII.01 )

Pri aliaj eblecoj, bonvolu peti informojn de ni .

PROGRAMO :

Matene : diversnivelaj kursoj .
Posttagmeze : Ekskursoj, kursoj aŭ libera tempo .
Vespere : amuzaj kaj kulturaj programoj .

EKSKURSOJ . Oni povas ekskursi kun gvidanto :
- unu tuttagon .
- tri posttagmezon .


Por la labora organizo, vi bonvolu indiki kiu(j)n vi ŝatus partopreni .

EKZAMENOJ de la Franca Instituto de Esperanto estos organizitaj laŭ peto.

-------- A T E N T U --------

Aliĝo al la sesa Esperanto-Semajno nur valoras post pago de aliĝrajto, t.e.,
60 FF antaŭ la 15-an de majo .
80 FF poste .

Mendo de loĝado valoras post pago de antaŭmendo de 150 FF .



Por ĉiuj informoj : (pour tous renseignements)

ESPERANTO
5, rue du Docteur ROUX, 5
F-34000 MONTPELLIER ( FRANCIO )

Comme chaque année, la Semaine internationale de Sète se déroulera à la Maison du Lazaret, au milieu d'un parc de deux hectares bordant la mer .

Il est possible de loger sur place suivant les tarifs (par personne) :

Dans une chambre pour une personne :
" " deux :
" " trois :

Les prix comprennent le logement et les trois repas. Mais seulement 40 lits sont disponibles, aussi

RESERVEZ RAPIDEMENT !!!!

Pour toutes autres possibilités, nous contacter.

PROGRAMME :

| | | |
|---|---|---|
| Matin | : | Cours de différents niveaux. |
| Après-midi | : | Excursions, cours ou temps libre. |
| Soirée | : | Programmes culturels ou de distraction. |

EXCURSIONS . Quatre excursions avec guide peuvent être organisées :
- une d'un jour entier .
- trois d'une après-midi .

Afin de faciliter notre travail, veuillez indiquer celles auxquelles vous comptez participer.

Des EXAMENS de l' Institut Français de l' Espéranto seront organisés sur demande .

------ A T T E N T I O N ------

Votre adhésion ne devient effective qu' après paiement d'un droit d'inscription de :
60 FF avant le 15 mai .
80 FF après .

La réservation d'une chambre n'est valable qu' après versement de 150 FF d' arrhes.

6-A INTERNACIA ESPERANTISTA SEMAJNO
ĈE MEDITERANEO
1983.IX.11/18

ALIĜILO
BULLETIN D' ADHESION

**********************************
Plenumu nur unu popersone
*Ne remplir qu' une fiche par personne*
**********************************

Familia Nomo / *Nom* / . . . . . . . . . . . . . . Persona Nomo / *Prénom* / . . . . . . . . . .

Adreso / *Adresse* / . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .
. . . . . . . . . . . . . . . . . . . .
. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Tel. Num / . . . . . . . .

*********************************

\+ Mi loĝos en la familia domo "Le Lazaret / *Je logerai à la maison "Le Lazaret"* / ☐ jes (*oui*) ☐ ne (*non*)

\+ Se jes, mi antaŭmendas unu liton en / *Dans l'affirmative, je reserve un lit*
☐ unupersona ĉambro / *dans une chambre pour une personne*
☐ dupersona ĉambro / *dans une chambre pour deux personnes*
☐ tripersona ĉambro / *dans une chambre pour trois personnes .*

\+ Se ne, mi tamen manĝos regule en "Le Lazaret" / *Dans le cas contraire, je mangerai quand même au "Lazaret3.* / ☐ jes (*oui*) ☐ ne (*non*)

\+ Mi deziras trapasi jena(j)n ekzameno(j)n /
*Je désire passer les examens suivants*

- □ Unua grado / *Premier niveau*
- □ Dua grado / *Deuxième niveau*
- □ Atesto pri kapableco
- □ Pedagogia Atesto

\+ Mi deziras partopreni la jenajn ekskursojn
*Je désire participer aux excursions suivantes*

- □ NIMES - LE PONT DU GARD ( en un jour /*en une journée* )
- □ ENSERUNE - BEZIERS - SEPT ECLUSES -
- □ AGDE ( Muzeo kaj kabo )
  ( *Musée et la Cap d'Agde* )
- □ Ŝipe al MEZE (*promenade en bateau* )
  La haveno de SETE ( *le port de Sète* )
  Bredejo de ostroj. ( *élevage d'huitres* )

duontaga /
*en une après-midi*

*CENTRE CULTUREL ESPERANTO*
*5, rue du Docteur Roux*
*F-34000 MONTPELLIER*

*CCP N° : 1 487 48 D*
*Poŝtoficejo de MONTPELLIER.*

## SEJOUR LINGUISTIQUE DE SÈTE .

Le Centre Culturel Espéranto de Montpellier est heureux de vous proposer de passer une semaine de vacances, de détente, au soleil de la Méditerranée, dans une ville immortalisée par le poéte et le chansonnier; en même temps, initiez-vous à l'ESPERANTO, ainsi qu'à de nombreuses autres activités.

La Méditerranée vous offre ses plaisirs ; offrez-vous le plaisir de les agrémenter de relations culturelles, humaines, d'excursions dans le Languedoc...

Faites avec nous, que vos vacances ne soient pas que des "simples vacances"...
...Mais des vacances enrichissantes.

OoOoOoOoOoOoO

Feriu tutan semajnon en agrabla urbeto ĉe l'mediteranea marbordo; samtempe, perfektigu vian scipovon de Esperanto, kaj partoprenu ĉiujn ajn kulturajn aferojn, ekskursojn tra nia regiono...

En la Familia Centro de Lazaret ( Sète ), kie la Kultura Esperanto-Centro organizas la aferon, la internacia kaj amikeca etoso donos al vi okazon konatiĝi kun alilandaj samideanoj...

Ĝis la plezuro konatiĝi kun vi !!!

ĉiu punkto estu traktata sur kolora panelo (formato 65 X 50), per bildoj, dokumentoj aŭ desegnaĵoj, legeblaj de dumetra distanco kaj okulfrapa.

ĉiu grupo povus dumvintre pretigi 2 aŭ 3 el ili, kaj en marto, dum la federacia kongreso, ni komparos ĉiujn kaj elektos la plej bonajn. Poste, ni pendigos ilin en publikaj lokoj. La avantaĝo estas ke male al kutimaj ekspozicioj, ni povas lasi la panelaron en iu loko, ne ĉeestante la tutan tempon.

Komprenեble, povas aldoniĝi kelkaj ne-menciitaj eroj.

Kiu pretas kunlabori ?

Jean HENIN
Beauregard
Route de Montcayroux
48500 LA CANOURGUE
Tel : (66) 32 86 36

**********************

*Bedaŭrinde, pro tro granda malfruiĝo en la eldono de Sud Francia Stelo, ne restas tro da tempo por prepari nian ekspozicion, surbaze de la proponaro de Jean HENIN.*

*Sed jam kelkaj grupoj pridiskutis la aferon, kaj mi mem sufiĉe bruis pri ĝi.*

*Ĉiukaze, ne temas pri luksa aŭ prestiĝa ekspozicio. Tiu celo ne estas nia. Ni nur volas prezenti al ne-esperantistoj firmajn argumentojn favore al Esperanto, okulfrapajn kaj konvinkigajn.*

*Do nur restas unu monato kaj duono, sed tamen mi esperas ke sufiĉos por realigi grandan parton de tiu laboro.*

*Xe la financa vidpunkto, ĉiuj elspezoj estos repagitaj al grupoj, kiuj partoprenos tiun kampanjon. Tamen, ni fidas je la ŝparemo de ĉiuj, kaj rememorigas al vi ke la federacio ne estas tre riĉa.*

*Bonan kuraĝon kaj ĝis la venonta kongreso, por kompari niajn laboron kaj sperton.*

La Prezidanto.

# loka vivo.

MONTPELLIER I N F O R M A S . . . .

**** La 20-an de februaro estos organizita en la kunvenejo de la grupo ("La croix Bleue", 15 rue du Fg Figuerolles, inter le Plan Cabannes kaj la bulvardo Renouvier), POSTTAGMEZA KUNVENO.*

- *Ekde la 12.30 komuna tagmanĝo. (ĉiuj kunportos sian propran manĝaĵon.)*
- *Prelegetoj, amuzaĵo, filmoj, dancoj, diapozitivoj, kantoj dum la tuta posttagmezo.*
- *Konciza trarigardo en la esperanta literaturo.*

- *Je la 17.00 la grupo oferas al ĉiuj varmajn trinkaĵojn.*

*Ne kiksita estas la horo por alveni aŭ foriri. ĉiuj estos bonvenaj,*
*ĉu ne plu aktivaj esperantistoj*
*ĉu ne-esperantista geedzo,*
*ĉu kuriozaj amikoj viaj*
*ĉu esperantistoj el aliaj grupoj*
*ĉu lernantoj aŭ lernintoj de Esperanto Kurso....*

*Estos bona okazo firmigi la rilatojn inter ĉiuj montpellieraj esperantistoj, precipe kun tiuj, kiuj pro diversaj kialoj, ne ĉeestas la grupajn kunvenojn.*

*Do, VENU MULTNOMBRAJ, INVITU KONATOJN ....*

*** La venontaj kunvenoj de la grupo okazos :
- la lundon 7-an de februaro .
- Ekstraordinara kunveno la dimanĉon 2o-an de febru.
- la lundo 7-an de ~~Aprilo~~. Marto
- Ne okazos kunveno en ~~Majo~~. Aprilo

*** Dum estrara kunveno la 24-an de januaro, oni akceptis gastigi, prefere je la komenco de junio, juna pola samideanino. Pri tio, respondecas Yvette VIERNE, 5, rue du Docteur Roux, Montpellier
Tel : 54 15 43



Pro familiaj kialoj, S-o CAPUS ne plu respondecas pri la sekretario de la grupo. Anstataŭas lin S-ino CALLET kaj S-ino LEENHARDT.

***Al tiuj, kiuj forgesis pagi la kotizojn, la kasist rememorigas la tarifojn :

| | membro | paro |
|---|---|---|
| Loka grupo + Simpla membro U.F.E. | 85 | 155 |
| Loka grupo + Plena Kotizo al U.F.E. | 180 | 270 |

kaj la poŝtĉekan numeron : Centre Culturel Esperanto
1 487 48 D MONTPELLIER

Via kotizo ebligas nin starigi efikan poresperantan propangandon. Do, NE FORGESU KOTIZI...

BEZIERS I N F O R M A S . . .

La venonta grupa kunveno okazos la sabaton 12-an de februaro en la kutima ĉambro de "Casernes St Jacques".

Aliparte, okazas kursoj de Esperanto en MJC, kune kun la Tria-aĝa Universitato.

Pri ĉiuj informoj :
CENTRE BITERROIS D' ESPERANTO
9, rue Georges PICOT BEZIERS
Tel : (67) 311318

NIMES I N F O R M A S . . .

Post translokiĝo de S-ino MOUNIER al Nice, pri la sekretariato respondecas S-o CARRE, helpata de nia juna amiko Franck CLEMENT.

Ni esperas al ili sukceson en tiu laboro, kaj esprimas nian deziron konatiĝi kun ili dum la venonta federacia kongreso.

La kunvenoj de la Nima grupo okazas ĉiujn lundojn unuajn, je la 18.15 en la Centro Pablo Neruda.

Pri informoj pli precizaj, nur aldonendas la adreson de S-ino VOLPELIERE
8, rue Rouget de Lisle NIMES

NARBONNE I N F O R M A S ....

S-o DELIGNE INFORMIS nin ke, malgraù provo starigi esperantan grupon en tiu urbo, oni devas konstati ke nur troviĝas nuntempe nur izoluloj.
ĉiukaze, ni esperas ke renaskiĝos esperanta grupo en Narbonne, kaj ke nova kaj juna sango revigligos la aferon.
Al ĉiuj, ni bondeziras kuraĝon kaj pretas helpi tiucele.

ALIAJ GRUPOJ I N F O R M A S . . .

Pro manko da tempo, oni ne povis kolekti informojn en la aliaj urboj de la Federacio.
Ni tamen transdonas al la leganto adresojn de la respondeculoj, kiuj tutcerte kaj samideane pretos informi lin.

En PERPIGNAN; ekzistas du grupoj sendependaj, pri kiuj respondecas niaj samideanoj :

S-o AMOUROUX
1, rue de Sorède Tel : (68) 345438

S-o Llech-Walter
72, av. du Gal de Gaulle
Tel : (68) 674127

En ALES : S-o PELLETIER
Mas de Rieusset 30480 CENDRAS

En CARCASSONNE : S-o BORQUE
6, rue Pablo Neruda
Tel : (68) 254513

*



# naciskale ..

SELEKTE INFORMI 1984 .

ĈU EFIKE ??

Kiel anoncite, okazis en la pariza sidejo de U.F.E la 22-an de januaro, naciskala kunveno por fajnigi la baldaù lanĉotankampanjon de U.F.E.: Selekte Informi 1984.(Mallongigo : SEL. IN. 1984) 8 federacioj (el la 12 ekzistantaj) estis reprezentitaj, interalie niaj najbaroj, Midi-Pyrénées kun R. Albault kaj Provence-côte d' Azur kun R. Triolle. La tuta estraro de U.F.E. ankaù ĉeestis.

S-o J.L. Teixier prezentis, je la nomo de la estraro, la ĝeneralajn aspektojn de la kampanjo. Unue, konstatendas ke la propagando al unuopuloj, naciskalaj komunikiloj, naciaj aù regionaj revuoj,..., ne estis tiel efika kiel unue pensite. Prefere sin turni al asocioj, organizoj iel komunikemaj.

Jen la kanvaso de la kampanjo, proponita de U.F.E. :

* Uniiĝo de tri homaj skipoj, kiuj kolektos surloke adreslistojn de tiaj asocioj, kaj poste sendos ilin al pariza sidejo.
  Enkomputiligo de tiuj adresoj.
* U.F.E. resendas al asociaj respondeculoj informleteron, por prezenti la celojn de la asocio nia kaj de E-o.
  Pertelefona loka kontrolo, por konstati la bonan trafon de la informletero.
* U.F.E. sendas duan leteron, Prezentleteron, al interesiĝantaj asocioj.(kun propagandiloj, E-o-Actualités...)
  Dua kontrola telefonalvoko de iu skipano.
* Tria ŝtupo estas pli firma kontakto kun la asocioj, per abono al E-o-Actualités,servoj (prelegoj, ekspozicioj, kursoj...)
* Je tiu punkto, U.F.E. nur daùrigas naciskalan propagandon,(abonon, kursojn..). Anstataùas ĝin la loka skipo, aù grupoj.

Aliparte, U.F.E. devigas la skipojn respekti du kondiĉojn :

Unua kondiĉo : Tiu kampanjo ne estas izolita, dummomenta.ĝi devas fariĝi konstanta, tutcerte plurjara.

Dua kondiĉo : Devas ekzisti kontrakto (interkonsento) inter la skipoj kaj la nacia asocio, kompense al financa investo.(uzo de la komputilo, paperletero, kovertoj, informiloj...)

Jen la kanvaso de tiu kampanjo, lanĉota dum la venonta nacia kongreso en Romans.

Pridiskutu ĝin, kritiku favore aù malfavore. Ariĝu en skipoj.

ĉiukaze, rediskutota propono dum nia federacia kongreso.

Raportis F. Maurin.

************** *Aldonendaj rimarkoj* **********

*Mi samopinias kun la konstato farita, tio estas ke eble plej efikus direktiĝi al jam strukturitaj organizoj, iel favoraj al nia idearo, ol al iu ajn. Ĉar ili estas pretaj iamaniere kunlabori, kial tiaj asocioj ne estos prioritataj. Aliparte, la ne-kuriozulojn nur konvinkos la tempo.*

*Sed mi devas substreki kaj bedaùri la kojkoton de la lokaj kaj regionaj instancoj, fare de U.F.E. Eĉ se ni ne estas viglaj, mi ne pensas ke oni povos solvi niajn internajn strukturajn problemojn tiel. Kompreneble, U.F.E. pravas kiam ĝi diras ke ili ne plu povas kunlabori kun la federacioj, ĉar ili estas malseriozaj. Sed, se tiu strukturo naciskale ne konvenas, ni trovos alian.*

*Do, la problemo fariĝas pli fundamenta ol ni povintus imagi unue. Efektive, krom kalkaj etaj rimarkoj, la kampanjo proponita de U.F.E. povas esti efika.*

*Sed ĉu ni povas imagi ke ĝi trafos, se ne ekzistas surloke firma bazo, strukturigita kaj respondeca?*

*Al tiu demando, mi esperas ke nia venonta federacia kongreso alportos partan respondon.*